

Sabine Fiedler

Universität Leipzig, Germanio / Germany

“[...] a slim core of Esperanto roots [...] and a huge periphery of (English) borrowings?”

Ĉu Esperanto fariĝas pli kaj pli angleca?

Resumo: La angla lingvo fariĝis la ĉefa ilo de internacia komunikado. Ĝia vasta uzado kiel lingvafrankao kondukas al ŝanĝiĝoj en multaj lingvoj. Influo sentblas sur ĉiuj strukturaj ebenaĵoj de la lingvosistemo, sed precipe en la leksiko. Kelkaj inter tiuj estas klare videblaj, aliaj kaŝitaj. Ĉi tiu artikolo provas prilumi la influon de la angla al Esperanto por eltrovi ĉu lastatempaj prognozaj pri la evoluo de ĉi tiu planlingvo estas kredablaj. La artikolo baziĝas sur korpuso de aŭtentika parola komunikado kompilita dum diversspecaj aranĝoj. La ĝenroj estis prelegoj, debatoj, laborkunsidoj, neformalaj ĉetablaj konversacioj kaj ekskursoj. Montriĝas, ke lingvoalternado kaj lingvomiksado (kaj ankaŭ la uzo de anglaj vortoj kaj frazoj) estas trovataj pli malofte en Esperanto ol en la uzo de aliaj (fremd)lingvoj kaj laŭkvante kaj laŭkvalite (t.e. rilate al la funkcioj). Gravan rolon ludas la alte evoluinta lingvokonscio kaj sinteno de lingvolojaleco inter Esperanto-parolantoj. La rezultoj havas paralelojn al la situacio en endanĝerigitaj lingvoj.

Ŝlosilvortoj: Angla lingvo; Esperanto; Lingvoalternado kaj -miksado; Leksikaj influoj; Propraĵoj de Esperanto-parolantoj.

1 Enkonduko

Ĉefe du kaŭzoj aŭ stimuloj igas min okupiĝi pri ĉi tiu temo. La unua estas la ĝenerala scio aŭ observo, ke niaj lingvoj (ĉefe la Eŭropaj, sed ne nur tiuj) ŝanĝiĝas sub la influo de la vasta uzado de la angla kiel lingvafrankao, precipe sur terenoj kiel populara kulturo, scienco, komerco kaj la medioj. Tiuj influoj estas bone dokumentitaj en fakliteraturo kaj vortaroj (vd. ekzemple Görlach 2001; Furiassi kaj aliaj 2012) precipe rilate al la leksiko. Sed la influoj sentblas same sur la ebenaĵo de la morfologio (ekzemple en la vortfarado), ankaŭ rilate al la sintakso, al la semantiko kaj al figuraj esprimoj. Kaj eĉ rilate al simbolaj signifoj lingvoj ŝanĝiĝas. Ekzemplo estas la litero *R*, kiu tradicie

staris por dormado, ronkado aŭ enuo en la la pasinteco en la germana, sed estas nun pli kaj pli anstataŭigata per la litero Z laŭ la angla maniero.

Do tio estas la situacio en multaj lingvoj hodiaŭ: tute normalaj procezoj, atendeblaj konsidere al la nuna pozicio de la angla. Malfacilas imagi, ke la situacio estas alia en Esperanto, kiu ja estas lingvo en ĉiama kontakto kun aliaj lingvoj, parolata de homoj kiuj konas multajn lingvojn, kiel studoj montras al ni (ekz. Fiedler 1998; Alòs i Font 2012) kaj inter kiuj ankaŭ la angla estas la plej lernata kaj uzata. Fakte la influoj al Esperanto devus esti eĉ pli grandaj ĉar ili venas de du flankoj: de la Esperanto-parolantoj kun la angla kiel gepatra lingvo kaj multaj el tiuj personoj plenumas gravajn taskojn en Esperantio, kaj flanke de ĉiuj aliaj parolantoj, kies gepatraj lingvoj estas influataj de la angla. Kontraste al tio mia ĝenerala impresio estas, ke Esperanto ne tiomgrade angliĝas kiel aliaj lingvoj.

Mi parolis pri du kaŭzoj kiuj igis min okupiĝi pri la temo. Per la dua mi revenas al la citaĵo en mia titolo. Montriĝas, ke la kritikantoj de Esperanto, do la skeptikuloj, pli kaj pli ofte uzas prognozojn kiel argumentojn kontraŭ la planlingvo: Ili priskribas la bildon kio laŭ ilia opinio okazus/os en la estonteco en la okazo ke Esperanto grandstile disvastiĝus/os. Unu el tiuj spekulativaj hipotezoj troviĝas en la konata libro de Philippe Van Parijs, *Linguistic Justice for Europe and for the World*:

[...]if Esperanto is to be made suitable for all contexts, it will need to beef up its lexical stock massively. Its internal resources make it possible to create an indefinite number of words by combining roots, but these long compounds have to compete with shorter imports from other languages, especially from those languages widely known among Esperanto speakers. [...] Consequently, like all Western languages today, Esperanto will massively borrow from English, possibly more than other languages because of its smaller initial stock. Hence it will not take that long for the dictionaries of Esperanto to start looking as bulky as those of other major contemporary languages with a slim core of Esperanto roots that can be learned in a matter of days and a huge periphery of borrowings (Van Parijs 2011: 43).

Aŭ, en Esperanto:

[...] Se Esperanto estu farata taŭga por ĉiuj kuntekstoj, ĝi devas pligrandigi sian leksikan stokon amase. Ĝiaj internaj resursoj ebligas krei senliman nombron da vortoj per kombinado de vortradikoj, sed tiuj longaj kunmetaĵoj devas konkuri kun pli mallongaj importaĵoj el aliaj lingvoj, precipe kun tiuj lingvoj kiuj estas vaste konataj de Esperanto-parolantoj. [...] Sekve, kiel ĉiuj okcidentaj lingvoj hodiaŭ,

Esperanto amase prunteprenos el la angla, eble pli ol aliaj lingvoj pro sia malpli granda komenca vortostoko. Tial ne pasos multe da tempo ĝis Esperanto-vortaroj komencos aspekti tiel ampleksaj kiel tiuj de aliaj gravaj lingvoj nuntempaj kun svelta kerno da Esperanto-radikoj lerneblaj dum tagoj kaj grandega periferio da pruntaĵoj.¹

La kontrasto inter la observoj pri la ŝanĝiĝo de etnaj lingvoj pro la kontakto kun la angla kaj prognozoj kiel tiuj de Van Parijs, unuflanke, kaj praktikaj spertoj pri Esperanto-komunikado, kiun ja ne vere karakterizas inklino al anglaj dirmanieroj (almenaŭ ne konscia), aliflanke, faras tiun temon fascina studobjekto.

2 Ĝisnunaj esploroj

Entute ne ekzistas multaj esploroj pri tiu temo. Fakte mi trovis du studojn nur. La unua estas publikigaĵo de Oliveira (2018) kun fokuso sur adaptado de pruntvortoj en Esperanto, ne la komparo kun aliaj lingvoj. La studo montras, ke la plejmulto de la pruntvortoj, kiuj trovis eniron en Esperanton, venis el la angla (proksimume 50%). Se oni rigardas tiujn vortojn detale, oni vidas, ke temas ĉefe pri propraj nomoj, realaĵoj aŭ t.n. kulturaj pruntaĵoj, ĉe kiuj vorto aŭ esprimo venas en lingvon kune kun objekto, fenomeno, inventaĵo (ekzemple *askio*, *haloveno*, *jutubo* kaj *fejsbuko*).

La dua estas studofina laboraĵo (magistra disertaĵo) de Okhuijsen (2011), studento de la angla en la Universitato de Amsterdamo. Sub gvidado de Wim Jansen li komparis pruntaĵojn el la angla en la nederlanda kaj en Esperanto. La fonto de la aŭtoro estas vortlistoj en la du lingvoj. La aŭtoro trovas similaĵojn rilate al la vortfarado. Interalie ekzistas konkurantaj esprimoj, kiuj montras ke neologismo el la angla ankoraŭ ne enradikiĝis. En Esperanto, kiel Okhuijsen montras, multaj terminoj el la angla ankoraŭ ne havas ekvivalentojn. En Esperanto la esprimo devas konformiĝi al la *Fundamento*. Prestiĝo estas motivo por pruntado en la nederlanda, sed ne en Esperanto.

1 Ĉiuj tradukoj estas miaj.

3 Leksika pliampleksiĝo en Esperanto

Laŭ la reguloj de la *Fundamento de Esperanto* (Zamenhof 1905),² la lingvo havas du manierojn por krei novajn vortojn, kiujn ankaŭ Van Parijs mencias. Regulo 11 priskribas endogenan principon, t.e. la formado de nova leksiko per rimedoj, kiujn la lingvo mem havas je sia dispono:

Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.

Regulo 15 priskribas ekzogenan manieron de vortfarado, t.e. la uzo de fremda leksika materialo kun struktura adaptado al Esperanto:

La tiel nomataj vortoj “fremdaj”, t. e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

Ambaŭ manieroj estas uzataj. Kelkfoje por la sama objekto eĉ ekzistas du vortoj prezentantaj la du diversajn modelojn de vortfarado, kiel ekzemple *malsanulejo* kaj *hospitalo* aŭ *tekstaro* kaj *korpuso*. La unue menciitaj esprimoj havas la avantaĝon, ke parolanto plene komprenas ilin surbaze de siaj Esperanto-konoj, dume ke la aliaj (*hospitalo*, *korpuso*) estas internaciaj kaj tuj kompreneblaj por homoj, kiuj konas tiujn el la gepatra lingvo aŭ aliaj fremdlingvoj.

Se ni okupiĝas pri la leksiko en la tereno de komputiko, kiu estas la fonto de multaj neologismoj kaj en kiu sentebblas enormaj influoj de la angla al aliaj lingvoj ekde jardekoj, ni unuflanke konstatas, ke multaj terminoj venis en Esperanton kiel pruntoprenaĵoj el la angla (ekz. *blog*, *podkasto* aŭ *spamo*). Aliflanke, kompare al aliaj lingvoj, montriĝas, ke en Esperanto oni ofte preferas la sin mem klarigajn endogenajn vortfarojn (vd. tabelon 1).

2 La *Fundamento* enhavas la 16 regulojn en la franca, angla, germana, rusa kaj pola lingvoj, sed ne en Esperanto. La esperanta versio de ĉi tiuj reguloj (kiujn mi citas sube) aperas en la *Fundamenta Krestomatio* (Zamenhof 1903).

angla	germana	Esperanto
provider	Provider	provizanto
software	Software	programaro
internet	Internet	interreto
e-mail (message)	E-Mail	retpoŝto/retmesaĝo
cell phone/ mobile phone	Handy ³	poŝtelefono
browser	Browser	retumilo/foliumilo/ TTT-legilo
chat room	Chatroom	retbabilejo
mailing list	Mailingliste	dissendolisto
server	Server	servilo
video projector	Beamer	projekciilo

Tabelo 1: Prikomputila leksiko en la angla, la germana kaj Esperanto (kunmetita surbaze de Nevelsteen 2012).

La impresio, ke Esperanto prunteprenas el la angla je pli malalta grado ol aliaj lingvoj, plifortiĝas, kiam ni rigardas oftajn anglismojn en aliaj lingvoj. La vortaro de eŭropaj anglismoj (Görlach 2001) enhavas transprenaĵojn en 16 lingvoj. Rilate al la 41 plej oftaj anglismoj (t.e. tiuj, kiuj estas konataj en almenaŭ 15 el la 16 pristudataj lingvoj) montriĝas, ke nur proksimume triono (13) havas ekvivalenton en Esperanto, la plejmulto (21) estas formataj indigene (ekz. *senhalte* por *nonstop*) kaj por la resto (7 vortoj) variantoj troveblas (ekz. kaj *frapfrazo* kaj *slogano* estas uzataj por la angla *slogan*). Kaj se temas pri la 13 t.n. anglismoj (*aerobiko*, *dopi*, *gangstero*, *grog*, *ĵazo*, *puding*, *pulovero*, *punko*, *puzlo*, *repo*, *tanko* kaj *smokingo* – kp. PIV de Sennacieca Asocio Tutmonda 2002; Wells 2010; Krause 2019), oni devas konsideri, ke pro la struktura kaj fonetika adaptadoj al Esperanto ili ne estas fremdaĵoj, kiuj kaŭzas problemojn por la uzanto. La Esperanto-leksiko dekomence estis

3 Esprimoj kiel *Handy* kaj *Beamer* estas precipe interesaj en tiu listo. Temas pri ŝajnpruntaĵoj (pseŭdopruntaĵoj). Oni formas vortojn laŭ la angla maniero pro la prestiĝo de tiu lingvo, sed la vortoj ne ekzistas en la angla kun tiu signifo. Tiu speco de pruntaĵo ekzistas en multaj lingvoj (kp. Furiassi kaj Gottlieb 2015).

internacia kaj tiuj vortoj ne vere diferencas de, ni diru, *birdo* aŭ *kisi*, kiuj same estas de angla deveno, sed jam aperas en la *Fundamento*.

Por studi la gradon de anglaj influoj al Esperanto pli detale ni nun volas okupiĝi pri lernoalternado (aŭ lingvomiksado), t.e. la konduto de parolantoj meze de komunikado transiri al alia lingvo per tuta frazo aŭ unuopaj vortoj aŭ esprimoj. Tiu fenomeno ŝajnas esti taŭga elirpunkto, ĉar pruntaĵoj ofte havas sian originon en spontanea uzado de elementoj en la lingvo. Lingvoalternado/lingvomiksado montras, kiomgrade parolantoj pretas enmeti fremdajn elementojn.

4 Lingvoalternado kaj -miksado

Tiu studado pri lingvoalternado/lingvomiksado baziĝas sur datumaro, kiu estis kompilita de Cyril Robert Brosch kaj mi kadre de projekto pri la uzado de lingvafrankaĵoj, inkluzive de Esperanto. Ĝi enhavas pli ol 200 komunikajn eventojn surbendigitaj dum Universalaj Kongresoj kaj aliaj Esperanto-aranĝoj.⁴ Por la studo de lingvoalternado ni uzis nur parton de la tuta studo konsistanta el 40 horoj. La ĝenroj estis prelegoj, debatoj, laborkunsidoj, neformalaj ĉetablaj konversacioj kaj ekskursoj.

Kion ni do eltrovis pri la uzado de diversaj lingvoj en Esperanto-komunikado?

Unue, oni devas distingi du tipojn: lingvoalternadon kaj lingvomiksadon. La unua priskribas la fenomenon, ke parolantoj ŝanĝas la lingvon pro diversaj kaŭzoj, ofte nelingvaj, ekzemple ĉar persono ne parolas Esperanton aŭ pro kaŭzoj de ĝentileco, kiel en ekzemploj (1) kaj (2). En (1) ekskursogvidanto dankas al la ŝoforo de la aŭtobuso, kiu ne komprenas Esperanton, pro klarigo. En (2) la reprezentantoj de la urbo Lille estas unue bonvenigataj en la franca.

(1) *Ni dankas nian ŝoforon por la klarigo. Merci, Philippe. Mi volas [...]*
(...) (Boulogne-sur-Mer, la 29-an de julio 2015)

(2) *Mesdames et Messieurs, les représentants de la ville de Lille et de la région. Altestimataj reprezentantoj de la urbo Lille kaj de la regiono.*
(Lille, la 26-an de julio 2015)

La dua tipo, lingvomiksado, signifas, ke unuopaj vortoj (ĉefe substantivoj) estas enmetataj en frazon aŭ tekston en alia lingvo, do en nia okazo vorto el la angla aŭ alia etna lingvo en Esperanto-paroladon, kiel en ekzemploj (3) kaj (4).

4 Pri la esplorprojekto ĝenerale vidu www.mime-project.org

- (3) *Ĉe edukado.net estas **curriculum** pri edukado al kulturo de paco, kio estas iomvasta priskribo [...]* (Lille, la 28-an de julio 2015).
- (4) *Nun eble mi bezonas helpon por trovi mian duan prezentaĵon, de la **desktop**, se eble* (Lille, la 30-an de julio 2015).

Tiu dua tipo estu nia fokuso, ĉar tiu lingva konduto en etnolingvoj estas la unua ŝtupo de pli daŭra enmetaĵo, do de pruntaĵo. Ni trovis lingvomiksadon en Esperanto, kvankam malofte, kun la sekvontaj kvar funkcioj:

A. Serĉado de ĝusta vorto

(5) *A: [...] niaj fakaj asocioj, multaj el ili montriĝas tre, mi ne povas uzi unu alian vorton ol la anglan, **reluctant***

B: malvolontaj

A: malvolontaj aŭ aŭ

B: malentuziasmaj

A: malentuziasmaj aŭ iel indiferentaj al la evoluo de [...], al lingvopolitikaj temoj. (Lille, la 30-an de julio 2015)

B. Subtenado de kompreno

(6) *(...) estas multaj galaksioj en grupo. Tiu grupo kiu nomiĝas eh grapolo de galaksioj, **cluster** en la angla, povas kurbigi sunradiojn en tre interesaj manieroj.* (Lille, la 27-an de julio 2015)

C. Prezento de io netradukebla (realaĵo)

(7) *Kaj la perfekte estas kompleksa akcionalo, kiu esprimas staton, kiu rezultis el la antaŭa ago, kiel nia esti -inta aŭ **Present Perfect** en la angla. Ĝis nun...* (Lille, la 31-an de julio 2015)

D. Evoko de humuro

(8)

*A: Ni trovu la lingvon. <nomo de persono>, **help us. Save the world. Eat the cake.***

B-E: @@@⁵

A: Ĉu iu volas?

C: Mi volus, sed mi ne plu havas spacon.

D: Ni povus lasi ĝin kiel vespermanĝo.

(Partizánske, en junio 2016)

Dua rezulto rilatas al la kvanto de lingvomiksaĵoj. Entute ni malmultajn ekzemplojn trovis (vd. tabelon 2). Inter la entute 81 okazoj, 28 (= 34,6%) estas anglaj enmetaĵoj, 16,0% estas francaj kaj 6,2% estas germanaj. Io interesa montriĝas, kiam ni rigardas la 28 okazaĵojn el la angla: nur 5 personoj estis

parolantoj de la angla kiel gepatra lingvo. Tio signifas, ke plejmulto da vortoj estis menciitaj de parolantoj de aliaj lingvoj, en kiuj tiuj enmetaĵoj jam fariĝis normalaj vortoj, pruntitaj el la angla. *Present perfect*, *cluster*, *desktop*, *curriculum* estas enmetaĵoj, rezulto de lingvomiksado, sed el la plej diversaj lingvoj, kaŭzita de la uzo de la angla kiel lingvafrankao.

	lingvo	horoj	nombroj de lingvomiksaĵoj	Lingvomiksaĵoj / horo
Reershemius kaj Lange (2014)	germana	80	305	3.8
Klimpfinger (2009)	angla	12	104	8.67
Fiedler (2016)	Esperanto	40	81	2.0

Tabelo 2: Lingvomiksado en Esperanto kompare al aliaj lingvoj

Laŭkvante la rezulto estas, ke lingvomiksaĵoj maloftas en Esperanto, kompare al datumoj pri la germana (Reershemius kaj Lange 2014) kaj la angla (uzataj kiel lingvafrankaoj) (Klimpfinger 2009). Kelkaj uzoj, kiuj estas priskribataj en la faka literaturo pri aliaj lingvoj kiel oftaj tute ne ekzistas en Esperanto, nome la enmetado de anglaj esprimoj aŭ fiksitaj unuoj pro prestiĝo, do por fari edukitan aŭ modernan, kosmopolitan impreson. Frazojn kiel la sekvantaj oni verŝajne ne trovas en Esperanto-komunikado, ĉar la angla ne havas tiel altan prestiĝon en Esperanto-rondoj kiel en alilingva komunikado:

**Mi faris tion just for fun.*

**Vi povas fari ĉion ajn. The sky is the limit.*

**Tio estis la plej bona kongreso ever.*

5 Sintenoj de parolantoj

Niaj esploroj troviĝas en kontraŭdiro al la opinio de Van Parijs.⁶ Esperanto-parolantoj ŝajnas preferi la proprajn lingvajn elementojn al anglaj transprenaĵoj. Ili volas montri, ke per la planlingvo ili kapablas ĉion esprimi sen prunteprenado el aliaj lingvoj. La korelacio inter la sinteno de la parolantoj kaj lingvomiksado, kiun niaj rezultoj sugestas, estas subtenata per aliaj studoj (Myers-Scotton 2005). Antaŭ ĉio estas paraleloj al endanĝerigitaj lingvoj. Ekzemple Jones (2005: 19) trovis, ke parolantoj, kiuj havas pozitivan

⁶ Vidu pli detalan analizon en Brosch kaj Fiedler (2018)

rilaton al sia lingvo – ŝia studo okupiĝas pri la malnoviĝanta Jersey Norman French (Jèrriais) – kaj uzas ĝin ĉiutage, malemas miksi lingvojn. Gardner-Chloros (2009: 104; mia traduko) mencias okazojn, ke en Grekio membroj de turke parolanta komunumo evitas lingvoalternadon “pro alta nivelo de konscio pri la neceso protekti sian lingvon kaj kulturon kontraŭ greka influo”.

La alta metakomunika konscio kaj la lingvolojaleco de Esperanto-parolantoj trovas siajn esprimojn en oftaj prilingvaj diskutoj. Oni nur rigardu la ampleksajn retajn diskutojn pri la demando, ĉu en Esperanto oni rajtas uzi la terminon “Frekvencvortaro” (Zychewicz 2008). Alia ekzemplo venas el diskuto en *Libera Folio* (del Barrio 2015) pri libro, kiun oni anoncis per la titolo “Nova akademia verko pri Esperanto”. Post nur malmultaj interŝanĝoj de opinioj pri la enhavo de la libro ekestis intensa disputo pri la uzo de la vorto “akademia” en Esperanto, kiun malfermis la mesaĝo en (9).

(9) 2015-07-07 14:24

Mi miras pri la senbrida uzo de la vorto “akademia” (ekz-e en la titolo de la artikolo kaj en iuj komentoj) en senco konata de mi nur en la angla. Ĉu “akademio” ne signifas “Societo, konstanta k oficiala, de beletristoj, artistoj aŭ sciencistoj” (PIV)? Ĉu la intencita signifo ne estus pli bone montrata de “faka”?

Kelkfoje kritiko ankaŭ rilatas al la uzo de figuraj esprimoj el aliaj lingvoj, kiel ekzemple en (10) pri la esprimo “maleolmordanto” (*Libera Folio* 2016), kiu verŝajne estas tradukaĵo de la angla *anklebiter*. (10)

A: Poento al la maleolmordanto <nomo de persono> por tiu manovro en tiel simbola momento.

[...]

B: [...] r a [= rilate al] “Maleolmordanto” kiu estas vorto pli amuza ol insulta, aparte pro tio ke vi samfrazo konsideras <nomo de persono> mem brilulo. Sed eble tiu esprimo ne estas tute internacia? Ĉu chinaj esperantistoj ekzemple komprenas vian celon. Mi volas renkonti tiajn brilulojn.

Ekzemploj kiel tiuj montras, ke en Esperanto-komunikado la lingvaĵo mem ĉiam ludas rolon. La lingva sistemo estis konscie alproprigata de la parolantoj kaj pro tio estas ĉiam ĉeestanta. Samtempe plejmulto da uzantoj ŝajnas konscii pri tio, kiom grava estas ĝusta lingvouzo kaj la observado de lingva normo. La sinteno de la parolantoj ludas gravan rolon por la evoluo de lingvo kaj oni ne malatentu ilin ĉe pritaksado de la prognozoj de Van Parijs.

La efikoj kiujn la angla havas tamen ne limigas sin al unuopaj vortoj, pri kies uzo aŭ neuzo oni povas diskuti. Ekzistas krome latentaj influoj, pri kiuj parolantoj eble eĉ ne konscias, forme de vortkombinaĵoj kaj dirmanieroj (ekz. la uzo de *havi* + substantivo, kiel en *Havu belan kongreson/agrablajn feriojn/...*; kombinaĵo kiel *adresi problemon, sentu vin libera* + infinitivo), tekstostrukturaj konvencioj aŭ salutmanieroj. Ankaŭ manieroj de vortformado estas transprenataj (ekzemple kunfandado kiel *muzaiko* el *muziko kaj mozaiko* aŭ *Breliro* el *brita eliro*). La tereno de pragmatikaj influoj indas apartan esploron. Same, el tiu vidpunkto estontaj studoj okupiĝu pri la uzo de interjekcioj kaj gestoj (sufiĉe ofte oni aŭdas *WOW* en Esperantujo kaj vidas la *Thumbs-up*-geston).

6 Konkludaj rimarkoj

Estis du kaŭzoj de mia okupiĝo pri influoj de la angla al Esperanto en tiu ĉi kontribuo. La unua estis la observado de nuntempaj tiurilataj ŝanĝoj en etnaj lingvoj. La dua estis lastatempaj prognozoj, ke en la okazo de grandstila pludisvastiĝo ĉi tiu planlingvo eĉ pli draste ŝanĝiĝos pro amasa pruntado el la angla. Malfacilas batali kontraŭ tiaj hipotezoj, ĉar neniu vere scias pri lingvoevoluo. Mi eĉ ne scias, ĉu oni batalu kontraŭ tiuj prognozoj, ĉar la devo pruvi ion aŭ doni argumentojn por tiuj tezoj ja estu sur la flanko de la homoj, kiuj faras la hipotezojn. Tamen estas fakto, ke por antaŭdiri ion por la estonteco oni devas koni la estantecon kaj pro tio indas aŭ verŝajne eĉ endas studi la nunan lingvouzon en Esperanto.

Ĉi-rilata analizo pri nuntempa Esperanto-komunikado montras, ke influo de la angla kompreneble ekzistas. Ĝi estas kaŭzata de la uzo de la angla kiel lingvafrankao kaj koncernas precipe la terenon de la leksiko. Tio estas normala procezo, ĉar lingvokontaktoj estas unu el la plej gravaj faktoroj por lingvoŝanĝiĝo. Sed nia esploro montras, ke la influoj al Esperanto estas pli malgrandaj ol tiuj al aliaj lingvoj. La angla ne ĝuas same altan prestiĝon. Pro tio observeblas la tendenco, ke ĉe la novformado de terminoj endogenaj rimedoj estas preferataj. Krome lingvoalternado kaj lingvomiksado estas trovataj pli malofte en Esperanto ol en la uzo de aliaj (fremd)lingvoj kaj laŭkvante kaj laŭkvalite (t.e. rilate al la funkcioj). Gravan rolon ludas la parolantoj de Esperanto, kiuj singarde kontrolas sian propran lingvouzon kaj tiun de aliaj parolantoj surbaze de sia alte evoluita lingvokonscio kaj sinteno de lingvolojaleco, kaj tial ne estu ignorataj ĉe pritaksado de evoluoj en la planlingvo. Estontaj studoj pri tiu temo donu pli grandan atenton al la opinioj de la parolantoj mem kaj ili inkludu esplorterenojn krom la leksiko.

Bibliografio

- Alòs i Font, H. (2012). Catalan Esperantists: Pacifists in a globalised world. *ICIP Working Papers*, 3, 1-49.
- Barrio, T. del (2015). Nova akademio verko pri Esperanto. *Libera Folio*. <https://www.liberafolio.org/arkivo/www.liberafolio.org/2015/nova-akademio-verko-pri-esperanto.html>
- Brosch, C. R., Fiedler, S. (2018). Esperanto and linguistic justice: An empirical response to sceptics. En M. Gazzola, T. Templin, & B.-A. Wickström (Red.). *Language policy and linguistic justice: Economic, philosophical and sociolinguistic approaches* (p. 499-536). Cham: Springer.
- Fiedler, S. (1998). Zu Merkmalen der Esperanto-Sprachgemeinschaft (Ergebnisse einer Probandenbefragung). En U. Becker (Red.). *Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen. Beiträge gehalten auf der 7. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 7-9 November 1997 in Berlin* (Interlinguistische Informationen, Beiheft 4) (p. 22-29). Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik.
- Fiedler, S. (2016). "(...) a slim core of Esperanto roots (...) and a huge periphery of (English) borrowings"? – Kommt es zu einer Anglisierung des Esperanto? En C.R. Brosch, & S. Fiedler (Eds.), *Plansprachen – Aspekte ihrer praktischen Anwendung (Beiträge der 25. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V., 13-15 November 2015 in Berlin* (Interlinguistische Informationen, Beiheft 23) (p. 49-67). Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik.
- Furiassi, C., Pulcini, V., Rodríguez González, F. (Red.). (2012). *The Anglicization of European lexis*. Amsterdam: John Benjamins.
- Furiassi, C., Gottlieb, H. (2015). *Pseudo-English: Studies on false Anglicisms in Europe*. Berlin / New York: De Gruyter.
- Gardner-Chloros, P. (2009). Sociolinguistic factors in code-switching. En B. E. Bullock, & A. J. Toribio. (Eds.), *The Cambridge handbook of linguistic code-switching* (p. 97-114). Cambridge: Cambridge University Press.
- Gardner-Chloros, P. (2013). Contact and code-switching. En R. Hickey (Red.). *The handbook of language contact* (p. 188–207). Hoboken, NJ: Wiley-Blackwell.
- Görlach, M. (Red.). (2001). *A dictionary of European Anglicisms: A usage dictionary of Anglicisms in sixteen European languages*. Oxford: Oxford University Press.
- Jones, M. C. (2005). Some structural and social correlates of single word intrasentential code-switching in Jersey Norman French. *French Language Studies*, 15, 1-23.

- Klimpfinger, T. (2009). "She's mixing the two languages together" – Forms and functions of code-switching in English as a lingua franca. En A. Mauranen, & E. Ranta (Red.). *English as a lingua franca: Studies and findings* (p. 348-370). Cambridge: Cambridge Scholars Publishing.
- Krause, E.-D. (2019). *Vollständiges Wörterbuch Esperanto-Deutsch*. New York: Mondial.
- Libera Folio (2016). TEJO ekamikas kun la Civito. *Libera Folio*. <https://www.liberafolio.org/2016/12/26/tejo-ekamikas-kun-la-civito/>
- Myers-Scotton, C. (2005). *Multiple voices: An introduction to bilingualism*. Newark, NJ: Wiley-Blackwell.
- Nevelsteen, Y. (2012). *Komputeko. Prikomputila terminokolekto* (2a eldono). Partizánske: E@I.
- Okhuijsen, G. (2011). *A comparison between English loan words in Dutch and their Esperanto equivalents*. Magistra disertaĵo. Amsterdam: University of Amsterdam.
- Oliveira, K. G. S. (2018). Loanword adaptation in Esperanto. *Jezyk. Komunikacja. Informacja*, 13, 72-80.
- Parijs, P. Van (2011). *Linguistic justice for Europe and for the world*. Oxford: Oxford University Press.
- Reershemius, G., Lange, D. (2014). Sprachkontakt in der mündlichen Wissenschaftskommunikation. En C. Fandrych, C. Meißner, & A. Slavcheva (Red.). *Gesprochene Wissenschaftssprache: Korpusmethodische Fragen und empirische Analysen* (p. 57-74). Heidelberg: Synchron-Verlag.
- Sennacieca Asocio Tutmonda (2002). *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV)*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Wells, J. C. (2010). *English-Esperanto-English Dictionary*. New York: Mondial.
- Zamenhof, L. L. (1903). *Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto*. Paris: Hachette.
- Zamenhof, L. L. (1905). *Fundamento de Esperanto*. Paris: Hachette.
- Zychewicz, A. (2008). Diskuto: Ofteco kaj frekvenco. *Yahoo Groups Revuloj*. <https://revuloj.yahooogroups.narkive.com/u4DLQI4G/ofteco-kaj-frekvenco>

Pri la aŭtoro

Sabine Fiedler estas profesoro pri lingvistiko en la Universitato de Leipzig (Germanio). Ŝi doktoriĝis en 1986 per disertacio pri angla faklingvo kaj habilitiĝis en 1999 en ĝenerala lingvistiko per studo pri la frazeologio en planlingvoj. Ŝiaj esplorterenoj estas frazeologio, interlingvistiko/planlingvoj, komunikado per lingvafrankao, tradukscienco kaj humurstudoj.

Retadreso: sfiedler@uni-leipzig.de

ORCID-numero: 0000-0003-4622-3544

About the author

Sabine Fiedler is a Professor of Linguistics at the University of Leipzig (Germany). She holds a PhD in English linguistics (1986) and a second degree (Habilitation) in general linguistics (1999). Her research interests include phraseology, interlinguistics/planned languages, lingua franca communication, translation studies and humour research.

Über die Verfasserin

Sabine Fiedler ist Professorin für Sprachwissenschaft an der Universität Leipzig. Sie hat 1986 mit einer Arbeit zur englischen Fachsprachenforschung promoviert und sich 1999 mit einer Studie zur Phraseologie in Plansprachen habilitiert. Zu ihren Forschungsgebieten gehören Phraseologie, Interlinguistik/Plansprachen, Lingua-franca-Kommunikation, Übersetzungswissenschaft und Humorforschung.

“[...] a slim core of Esperanto roots [...] and a huge periphery of (English) borrowings?” – Is Esperanto becoming more and more English?

Abstract: Using English has become the dominant means of international communication. Due to its role as a lingua franca, it is a major source of language influence worldwide. The enormous impact of English on other languages can be felt across all levels of linguistic systems, but especially in the field of lexis. Some of these influences are clearly visible while some others are hidden. This article sheds light on the impact that English has on Esperanto in order to test recent predictions about the development of the planned language. It is based on a corpus of authentic spoken data that were obtained in a variety of communicative settings (including speech events such as spontaneous everyday conversations, panel and working-group discussions, interviews and outings). Code-switching, in-

cluding the insertion of English words and phrases, is shown to be used in a limited variety of pragmatic functions and to a considerably lesser degree than in other languages. This can be attributed to the speakers' developed metalinguistic consciousness, attitudes such as linguistic loyalty and shared community norms. The findings suggest similarities between Esperanto and minority or endangered languages.

Keywords: English; Esperanto; Code-switching; Lexical influences; Attitudes of Esperanto speakers.

„[...] a slim core of Esperanto roots [...] and a huge periphery of (English) borrowings?“ – Wird Esperanto immer englischer?

Zusammenfassung: Die englische Sprache ist weltweit zum dominierenden Kommunikationsmittel geworden. Durch ihre Verwendung als Lingua franca ist sie gegenwärtig die hauptsächliche Quelle von Einflüssen, die auf allen Ebenen des Sprachsystems spürbar sind, vor allem jedoch im Bereich der Lexik. Einige dieser Einflüsse sind deutlich sichtbar, während andere indirekter Art sind. Dieser Beitrag beschäftigt sich mit dem Einfluss des Englischen auf das Esperanto, um einige jüngst gemachte Vorhersagen zur Weiterentwicklung des Esperanto zu überprüfen. Er basiert auf einem Korpus gesprochener Daten, das eine große Breite von Textsorten beinhaltet, wie z.B. Alltagsgespräche, Panel- und Arbeitsgruppensprechungen, Interviews und Exkursionen. Es zeigt sich, dass Codeswitching (einschließlich der Verwendung englischsprachigen Materials) im Esperanto insgesamt seltener und in einer begrenzteren Anzahl pragmatischer Funktionen auftritt als in anderen Sprachen. Das kann mit Spracheinstellungen von Esperantosprechern, wie z.B. Sprachloyalität, sowie ihrem entwickelten metasprachlichen Bewusstsein erklärt werden. Die Ergebnisse weisen Parallelen zur Situation in bedrohten Sprachen auf.

Schlagworte: Englisch; Esperanto; Codeswitching; Lexikalische Einflüsse; Einstellungen von Esperanto-Sprechern.